

REDAKCIO:
PRAHA II. DITTRICHOVA UL. 7. BOHEMUJO.
ED. KÜHNL.

2. VIII. BOHEMA REVUO ESPERANTISTA. 1914.

Cena: 30 hal.

Nepovažujeme za povinnost odpovídati na dotazy, k nimž nebyla přiložena známka na odpověď.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ

BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj kaj de CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

(OFICEJO: PRAHA II., VODIČKOVA ULICE 38.)

Vychází 10krát ročně (kromě prázdnin).

Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk a vrací netištěné rukopisy, byla-li přiložena známka; práce původní mají přednost.

Předplatné v Rakousku 3 K, pro cizinu Fr. 3·75 — 1½ Sm.

Účet pošt. spoř. 93.281.

(Prosíme o adresy přátel Esperanta, kterým bychom mohli zaslati s úspěchem ukázkové číslo.)

Aperas dekfoje en jaro (krom libertempo.)

La redakcio rezerav sal si la rajton aranĝi la artikolojn por preso kaj resendas manuskriptojn nepresitajn, se poŝtmarko estis almetita; artikoloj originalaj estas preferataj.

Abono en Aŭstrio 3 K, por la fremdlando Fr. 3·75 — 1½ Sm.

Konto će la Ĉekbanko Esperantista en London. (Filio: Dresden. Bankejo Arnhold.)

STRIKO:

*Pro **striko** en la presejoj — preskaŭ ¼-jara — ne povis aperi regule ĉiuj n-oj la nova jarkolekto 1914. Ni klopodos nun eldoni ĉion mankantan kiel eble plej baldaŭ. — Red.*

Stávka:

Poměry v tiskárně, kde po dobu téměř ¼ roku se nepracovalo z důvodů veřejnosti známých, zavinily, že i toto číslo vychází opozdčně. Ačkoliv nelze pro nával práce v tiskárnách vysaditi nyní dvojčíslo, vynasnažíme se vydati další čísla tohoto ročníku dle možnosti nejdříve. Doufáme, že shovívaví přátelé nás omluvili. — Red.

DE LA UNUA IDEO ĜIS LA UNUA VIKTIMO.

(*El „Kronika práce" de M. Pokorný trad. Fr. Novák*). *Fino.*

La triumfado de sennombra papolamaso estis senfina kaj la Pariza Akademio de Sciencoj elektis komision por esplori la eltrovon. Sed la Parizanoj, ne volante longe atendi decidon de la akademio, kolektis rapide inter si sumon de 10.000 fr. kaj starigis komitaton, kiu per direktado de la nova entrepreno komisiis profesoron de fiziko Charles, kaj la fratoj Robert, famaj meĥanikistoj, ricevis la taskon konstrui balonon.

Pri la eksperimento de fr. Montgolfier oni havis detalan priskribon, sed pri speco de la uzita gaso la fratoj obstine silentis.

Charles, ne sciante alian helpon, decidiĝis do por hidrogeno. Sed tio estis tre malfacila, ĉar oni bezonis da gaso pli ol 7.000 kb. futojn. La scienculoj ankaŭ avertis pri la troa brulemeco de hidrogeno.

Sed Charles ne cedis, kaj oni komencis produkti la hidrogenon: Barelon oni plenigis parte per fera fajlajo kaj akvo kaj en la supran kovrilon oni faris du truojn. El unu kondukis leda tubo al la balono. La alia servis por alverŝadi sulfuracidon (sulfhidrikan acidon). Sed la acidajo kaŭzis tian varmiĝon en la barelo, ke multaj vaporoj akvaj kaj acidaj samtempe kun la hidrogeno amasiĝis en la balono, kaj oni timis, ke ĝi krevos. La vaporoj baldaŭ densiĝis kaj la aperantan akvon oni devis konstante ellasadi; pro la grandega varmiĝo oni devis la balonon senĉese superverŝadi per akvo.

Dum tiu laboro oni perdis tiom da gaso, ke por plenigi balonon larĝan 12 futojn (4 m) oni laboris dum 4 tagoj kaj oni bezonis 1000 kg. da fero kaj 500 kg. da sulfuracido.

La 28. de aŭgusto 1783 je la 5 h. posttagmeze ĝi ekflugis kun tia rapideco de la Champ de Mars, ke en kelkaj minutoj ĝi atingis la nubojn. Pli ol 200.000 homoj rigardis la spektaklon, ĝis la balono malaperis en la nuboj. Sed jam post 3/4 de horo falis la balono teren je distanco de 2½ de mejloj de Parizo, ne absolvinte la vojon, por kia ĝi estis kapabla, ĉar fratoj Robert, malgraŭ averto de Charles, plenigis ĝin per tiom da gaso, ke la balono en la supra maldensa aero krevis, rapide malaltiĝadis, kaj falis teren apud unu vilaĝo, kies loĝantoj, plenaj de miro kaj angoro, vidante globon teruran teren flugi, pensis, ke la luno de ĉielo falas.

Kiam fine la balono kuŝis sur la tero, duone platiĝinta, ili rekonsciiĝis el sia konsterniĝo, kaj opiniante nun, ke tio estas ia sorĉaĵo, ili alkuris kun draŝiloj kaj forkegoj kaj disŝiris kaj dispikis la belan balonon, kiu kun tiaj klopodoj estis konstruita. Fine ankoraŭ por malhonoro ili ligis ĝin al vosto de ĉevalo kaj trenis

ĝin dum tuta horo trans kampoj kaj deklivoj. Charles, alveturinte el Parizo ĝin serĉi, trovis sole iom da ĉifonoj. Pro la granda ekscitiĝo, kiun la afero kaŭzis, devis la registaro publikigi proklamon por klarigi la eltrovon.

La eksperimenton ĉeestis Stefano Montgolfier kaj la sukceso instigis lin tiom pli multe, ke li entreprenis novan provon. La 19ⁿ de sept. 1783 en Versailles antaŭ la reĝa kortego kaj granda popolamaso li refoje flugigis balonon, el malmola ŝtofo, globforman, blue pentritan kaj orumitan, sub kiu pendis fermita korbo kun la unuaj aerveturantoj. Sed ne ankoraŭ homoj! Ili estis: koko, anaso kaj ŝafo. La balono flugis tre alten, sed de la vento iom fendita, post 10 min. ĝi jam falis en proksiman arbaron tiel malrapide, ke al la bestoj nenio okazis.

La unua, kiu alkuris kaj la balonon liberigis el la arbaĵo, estis Pilatre de Rosier, kiu de tiu tempo ekinteresiĝis fervore pri la aerveturado.

Post la feliĉa rezultato kun la bestaj pasaĝeroj konstruis Stef. Montgolfier balonon, kiu povus porti kelkajn personojn. Kiam ĝi estis preta, proponis sin Pilatre de Rosier flugi en ĝi. Ĝis tiu tempo la homoj ankaŭ jam ekflugis, sed sole per balono ligita je ŝnurego, kaj sole ĝis alteco de 300 futoj. La liberan flugon volis neniu kuraĝi. La reĝo mem ne volis tion permesi, sed li permesis, ke en la balono flugu du mortkondamnitaj krimuloj, kiuj en okazo de sukceso estu pardonitaj. Sed Rosier protestis, dirante, ke estus por la homaro tre malhonoriga, se krimuloj, jam eksigotaj el la homa societo, havus la gloron pri la unua aerveturo. Fine li atingis helpon de markizo d'Arlande, kiu, por konvinki la reĝon pri la sendanĝereco de entrepreno, sin mem proponis kunveturi. Tiam konsentis la reĝo kaj la 21. de okt. 1783 Pilatre de Rosier kaj markizo d'Arlande ekflugis de la kastelo La Muette apud Parizo. La balono estis tre zorgeme aranĝita, 70 futojn alta, 46 f. larĝa. Sub la balono troviĝis galerio por la veturantoj kaj fajrujo. Ili flugis dum forta vento trans Parizo kaj post 25 min. ili alteriĝis 1½ de mejlo de la kastelo. La markizo tuj rajde revenis al la kastelo raporti pri la feliĉa reveno, kaj Rosier dume kunmetis la balonon kaj revenis kun ĝi en Parizon.

La sukcesplena flugo kaj la komuna entuziasmo ne lasis trankvilaj Charles kaj Robert, kaj jam la 1. de decembro ili ekflugis en nova, per hidrogeno plenigita balono.

Charles provizis la balonon per ĉio, kion li opiniis bezona, ĉirkaŭis ĝin per reto, kunprenis balaston, ankron, barometron, kaj aranĝis klapon. Kiel balonŝtofon li elektis tafton, kiun li per kaŭĉuko faris hermetika. Ĉirkaŭ Tuilleries, de kie la balono estis ekflugonta, amasiĝis sennombra homamaso, rigardanta senpacience

la balonon, kiu balancis sur longaj ŝnuroj, kiam subite venis la malpermeso de la reĝo, pro „danĝereco de entrepreno“. Sed kiam la ekscitiĝo en la popolo kreskis, kaj de ĉiuj flankoj oni insiste petis la reĝon, Ludoviko XVI. cedis kaj permesis. Kanono pafis. Charles kaj Robert eniris la ŝipeton, kaj trankvile flugis la balono ĝis la alteco de 1800 futoj (600 m). — 4½ de mejloj de Parizo apud Nesle ili malsupreniris; la unua eliris Robert, sed oni forgesis antaŭe sekurigi iel la balonon, kiu, perdinte per foriro de Robert 130 funtojn da balasto, kun granda rapideco suprenflugis ĝis alteco de 9000 futoj (3000 m), kaj nur post 15 min. sukcesis Charles reveni al tero. Tiun tagon li vidis la sunon dufoje subiri.

La unuan flugon kun antaŭe difinita celo entreprenis Blanchard kun amerikano Jeffrys la 7. de jun. 1785 de Dover al Calais; tiun vojon ili plenumis en 2 horoj 32 min.

La vojo por ili ne estis sen danĝero. Ilia balono ne tenis bone la gason kaj tial ĝi tre rapide malaltiĝis super la maron. La veturantoj devis ĉion eljeti, nutrajojn, librojn, ankron, eĉ ĉiun sian veston, por ne fali en la maron. Je rememoro de la feliĉa flugo trans la maron Francoj konstruis sur la loko de alveno memorkolonon.

La jaluza Rosier, volante egalvalori al Blanchard, volis la saman vojon plenumi en mala direkto, per balono laŭ lia nova metodo aranĝita, ĉe kiu li uzis ambaŭ manierojn. Sub la balonon kun hidrogeno li alfiksis cilindroforman parton, sub kiu li hejtis, malgraŭ tio, ke mem Charles lin avertis, dirante: „Amiko, vi pendigas ja pulvobarelon super la fajron!“ 13. junio 1785 li ekveturis en Calais. Baldaŭ li troviĝis super la bordo. Li volis alteriĝi, malfermis la klapon, kaj tiu ĉi, malbone aranĝita, restis malfermita kaj la balono kun terura rapideco falis teren, per stranga kaprico de la sorto kelkajn paŝojn apud la kolono de Blanchard.

Rosier kun sia kunulo estis morta; li estis la unua aerveturanto kaj ankaŭ la unua en la senfina vico da oferoj.

Je fino de la jaro 1913 konigas la aviadista statistiko, ke dum tiu jaro traflugis mem la 1378 f r a n c a j aviadistoj 13 milionojn da km (en 1912 tri milionojn), t. e. 133.800 horoj, kaj ke ili trovis 48 000 pasaĝerojn.

Estis jam atingitaj rapideco de pli multe ol du cent km en unu horo, alteco de 7000 m kaj per unu aparato povis leviĝi samtempe eĉ sep homoj ĝis alteco de 6000 m.

LA NOVA JARO.

(*Fino*).

Kompreneble, la novjaraj gratuloj estis en Romo tre ŝatataj. La simplaj same kiel la nobelaj Romanoj deziris unu al alia feliĉegon, „Annum novum faustum felicem!“ oni aŭdadis tiel multnombre kaj ĝoje, kiel ĉe ni „Feliĉan novan jaron!“ Sed ankaŭ la novjaraj donacetoj estis tie kutimaj kaj ŝatataj. Oni nomis ilin „strenae“, kiun vorton la Francoj ĝis nun konservis en sia „étrennes“. Tiun nomon prenis la Romanoj el nomo de sia diino Strenia, kiun adoris la Sabinoj, kunaŭtoroj de la pli posta Romo, kiel diinon de ĉia beno. El ŝia sankta arbareto oni alportadis bonsignajn branĉojn en la kastelon. Pli poste, kiam Romo pligrandiĝis, la Romanoj, por daŭrigi memoron pri tiu kutimo, sendadis donace unu al alia branĉojn de palmoj kaj olivarboj kaj aldonadis sekigitajn daktilojn, figojn kaj mielkukon, por ke la tuta jaro alportadu al la ricevinto sole dolĉajojn kaj agrablajojn. Kaj ĉar plimulto da homoj por la surtera feliĉo de pratempo bezonadis ĉiam monon, estis al la cititaj donacetoj aldonata ankaŭ monero, por ke la mono sin tenu ĉe la ricevinto dum la tuta jaro. Tiucele oni preferadis la moneron, kiu prezentis la bildon de Janus, aŭ de Saturnus, t. e. de dioj de la feliĉa tempo pasinta.

Iom post iom evoluiĝis la kutimo, kompensi la feliĉoportajn kaj dolĉajn donacetojn per donaceto simbola. Do la Romanoj sendadis unu al alia ornamajn lampojn argilajn aŭ bronzajn kun bildo de la diino de venko, sur kies ŝildo estis neevitebla novjara saluto „Annum faustum felicem!“ Kaj ĉirkaŭ la diino bildigis la artisto palmobranĉojn kaj la ceterajn donacetojn, kiuj alportas feliĉon.

Frumatene de la Nova Jaro al la riĉaj kaj potencaj patricioj alvenadis kun respekta gratulo amasoj da klientoj. Ili ja ĉiutage dum tagiĝo sin prempuŝadis en palaca vestiblo, atendante ordonojn de la sinjoro, sed je la Nova Jaro ili alportadis ankaŭ donacetojn, kompreneble atendante abundan kompenson. En la imperiestra epoko jam de post la imperiestro Aŭgusto akceptadis la novjarajn donacojn de la regatoj ankaŭ la imperiestroj, kaj Kaligula mem staris en vestiblo de la palaco kaj akceptadis ilin per la propra mano.

Se oni deziris, ke la tuta jaro estu gaja — kaj kiu ne dezirus tion — estis necese esti gaja je la Nova Jaro. Hodiaŭ oni trovus sufiĉe da homoj, kiuj direktiĝas laŭ la principo: Estas dolĉe fari nenion, sed ankoraŭ pli dolĉe ripozi post tia laboro. En la antikva Romo eble ne estis partianoj de ĉi tiu nobla doktrino. Je la Nova Jaro ĉiu eklaboris super sia kutima okupaĵo — kompreneble nur prove, por ke li sukcesadu dum la tuta jaro. Por ĝojo kaj gajeco restis ankoraŭ poste sufiĉe da tempo. Ĝojiĝis la tuta popolo kaj

super la ĝojplena urbo leviĝis bonodora fumo el incenso kaj e oferoj, kiuj sur la multnombraj altaroj flagris je honoro de dioj.

Ankaŭ la kristanoj malgraŭ la seriozeco de siaj moroj kaj spite la severeco de sia disciplino baldaŭ ektrovis plaĉon je la novjaraj amuzajoj. Ni scias tion laŭ tio, ke la ekleziestroj ofte tion al ili malpermesadis, kaj ankaŭ diversaj verkistoj tion notis. Tiel ekz. sofisto kaj oratoro Libanios en la IV. jc. rakontas, ke la Nova Jaro estas ĉie festata, kie etendiĝas la romana imperio. Li skribas, ke ĝi estas festo de ĝenerala ĝojo, de frata komunikemo kaj komplezа malavareco, ke en tiu tago eĉ almozulo fartas bone; ke la homoj opinias, ke se ili komencos la jaron gaje kaj libere, ke ankaŭ la tuto jaro estos tia. Oni atendas alvenon de la jaro en la nokto. Gaja bando iras tra la stratoj kantante kaj bruante, enfalas en la domojn kaj per senbridaj ŝercoj vekas la domanojn el dormo. Reciprokaj donacetoj ĉie estas ŝatataj, estas devizo de la tago ĝoji kaj ĝojigi la aliajn.

Jam el tiu tempo devenas aludoj pri bandoj de novjaraj maskitoj, kiuj iradis de domo al domo, farante diversajn ŝercajojn kaj ankaŭ per ludoj amuzante la domanojn por la ricevitaj donacetoj. Viroj alivestiĝadis je virinoj kaj male, kaj surmetadis diversajn maskojn. La eklezio tion malaprobadis, ĉar en alivestiĝo oni povis fari multajn ekscesojn. Ĉagrenoplenan riproĉon ni legas el mezepoko: „Ili vestas sin per feloj de bestoj, surmetas la bestkapojn, ĝojante, kiam ili sukcesas tiel ŝanĝi sian eksterajon, ke ili eĉ ne aspektas kiel homoj. Ja kelkaj viroj eĉ tiel forgesas pri sia digneco, ke ili sin vestas per virina vestaĵo, kvazaŭ volante seniĝi je sia vireco."

Por veki humoron plejeble gajan kaj saluti la Novan Jaron per petola gajegeco precipe la Germanoj kaj Francoj kaj poste laŭ ilia ekzemplo ankaŭ iliaj najbaroj en la silvestra nokto eksidadis ĉe la biero kaj vino kaj senlace sin fordonadis al trinkado. Tiu kutimo spite ĉiuj societoj de abstinenculoj kaj spite la trinkaĵaj impostoj floras ĝis hodiaŭ kaj el ĝi naskiĝas la brua kaj petolega gajeco grandurba, kiun ni supre aludis.

Nun ni povas jam, miaopinie, respondi la demandon supre donitan. La senbrida novjara gajeco kun ĉio, kio ĝin akompanas, estas kultura (aŭ pli vere nekultura) restaĵo el la longe pasintaj jaroj. Estas en ĝi nemalgranda mezuro da antikva kaj mezepoka superstiĉemo, kiu persiste katenas la nuntempajn homojn malgraŭ la ĉu vera, ĉu fierema progresemo de la nuna epoko. La kredo ke oni per feliĉa komenco povas alsorĉi sukceson de la venontaj tagoj, estas transportata de la pratempa simboliko al aferoj kaj agoj nesimbolaj, kiuj jam longe forpuŝis konscion pri la senco de la pratempaj simboloj. Tio okazas tiom pli facile, ĉar en la sukcesa

komenco de nia laboro aŭ de iu ajn entrepeno ni rajte vidas promesoplenan antaŭsignon por ĝia plua evoluiĝado. Ne senkaŭze instruas nin proverbo: Komenco bona, laboro duona.

(*Laŭ F. J. Vykoukal trad. K. Procházka*).

POR LA VIVO.

Latinaj dirmanieroj kaj ilia signifo. (II.)

Audiatur et altera pars (***Estu aŭskultita ankaŭ la alia partio***): Por juĝi senpartie oni aŭskultu post akuzo la defendon.

Austriae est imperare orbi universo (***Aŭstrio estas destinita regi la tutan mondon***). Ambicia devizo de la aŭstria dinastio. Mallonge: A. E. I. O. U. Samlitere komenciĝas la germana traduko: Alles Erdreich ist Oesterreich untertan (Ĉiu tera regno estas submetita al Aŭstrio). Aliloke oni ankaŭ legas: Austria erit in orbe ultima (Aŭstrio estos en la mondo la lasta). Analogie en Esperanto: Aŭstrio estu imperio ordonanta universon.

Beati possidentes (***Feliĉaj la posedantoj***). Eldiro ofte aŭdata, de post kiam Bismarck ĝin faris moda. Ĝi signifas: Por senrajtigi je sia profito iun landon, estas bezone pli frue ĝin ekposedi.

Carpe diem [***Profitu la (hodiaŭan) tagon.***] Vortoj de Horacio, kiu ofte reatentigas, ke la vivo estas mallonga, kaj ke oni devas uzi ĉiun tagon profite.

Casus belli (***Batalmotivo***). Esprimo uzata pri la ago, kiu povas kaŭzi malamikecon inter du nacioj.

Caveant consules! (***Atentu, konsuloj!***). Unuaj vortoj de la formulo daŭrigata: ... ne quid detrimenti respublica capiat (... ***ke la respublikon ne trafu iu malutilo***), per kiu la romana senato en krizaj momentoj solene enoficigadis (investadis) la konsulojn kiel direktorojn. Figure uzata frazo pri la publika opinio, avertanta ĉefulojn, kiuj gvidas publikajn aferojn.

Corpus delicti (***Atestaĵo pri la delikto.***) Objekto pruvanta ekziston de la delikto, aŭ helpilo, per kiu la delikto estis farita, aŭ rezultaĵo de la delikto.

Deus ex machina (***Dio venigita per maŝino***). Antikva esprimo teatra montranta intervenon de Dio aŭ de supernatura estaĵo, kiu venas sur la scenejon per maŝino. Figure: Pli feliĉa solvo de malfacila situacio, ol oni povus supozi.

Diem perdidi (***Mi perdis tagon***). Vortoj, kiujn diradis la romana imperiestro Tito, kiam li pasigis tagon, ne trovinte okazon por fari bonon.

Ecce homo! (***Jen homo!***) Vortoj de Pilato al Hebreoj, kiam

li estis montranta al ili Kriston, havantan en mano kanon kiel sceptron kaj dornan kronon sur la kapo. Formo uzata por anonci sin aŭ ies alvenon. *(Daŭrigo).*

SIBERIO.

La fame konata samideano pastro J. Seriŝev eldonas sian interesan verkon en Esperanto pri Siberio kun multaj ilustrajoj, kiu certe estas tradukota en diversajn naciajn lingvojn. Aperos kelkaj volumoj, skribitaj por la vasta publiko. La nomo de aŭtoro garantias verkon ne nur seriozan sed samtempe tre interesan. —

Permesu al mi rakonti ion pri *juna Siberio*, laŭ mia sperto kaj scio:

La transsiberia fervojo disvolvis forte la mirigan evolucion de mallarĝa terparto, tra kiu ĝi trairas de Ĉeljabinsk ĝis Vladivostok, dum tiuj 18 jaroj de sia ekzistado. En la regiono aperis multe da novaj vilaĝoj, komercaj centroj eĉ urboj, kie pli frue tute nenio estis. Inter la novaj urboj havas Tatarsk 20.000, Novonikolajevsk 100.000, Tajga 14.000 kaj Bogotol 18.000 da loĝantoj. Dum tiu tempo la malnovaj urboj trioble kreskis estante pli frue malgrandaj vilaĝoj sen lumigo, akvigo, sen ŝtonaj pontoj ktp. Nun havas du urboj tramvojon kaj en pluaj urboj oni ĝin projektas. Antaŭ la ekzisto de fervojo estis tie nek importo, nek eksporto; la fervojo malfermis al Siberio eŭropan komercejon. Pli frue oni nomis Siberion Kamĉatko de Eŭropo, ĉar Rusujo (eŭropa) estis kvazaŭ komisiisto de Siberio kaj havis de tio grandan materialan profiton. Sed Rusujo malbone mastrumis kaj diradis, ke ĝi tute ne bezonas Siberion. Ankoraŭ antaŭ ok jaroj rekomendis unu konservativa verkisto (Menŝikov), ke Rusujo ***vendu Siberion al Japanujo!*** Valoro de Siberio kreskas ĉiujare kaj ni povas diri, ke la fervojo vekis Siberion, kiu faras nun miraklojn. Siberio komencis memstare komercadi kun Eŭropo: ĝi eksportas jare por 56 milionoj da rubloj buteron, neprilaboritajn valorajn bestofelojn por 16 milionoj ktp. Kontraŭe Siberio aĉetas jare por 18½ milionoj agrikulturajn maŝinojn ktp.

Subite donis Siberio tiom da greno, ke estis mirigita ne nur Rusujo, sed eĉ la Siberianoj mem kaj la siberia greno plenigis eŭropajn vendejojn, forprenante al Rusujo (eŭropa) eblecon konkuradi sur tiu ĉi kampo. Sekvis nepripensita paŝo de rusa registaro, kiu starigis en ruslima siberia urbo Ĉeljabinsk limdepagejon, kiu prenas grandan limdepagon por la la siberia greno. La eksporto estis preskaŭ tute ruinigita per tio, kaj Rusujo malgraŭ tio ĉiujare sendis proksimume unu milionon da malsataj elmigrantoj Siberion, por ke ili ne faru hejme revolucion. Sed tiuj elmigrantoj ankaŭ nenion alian povis fari, krom terkulturado, tia-

maniere la kreskado de grenorikolto ankoraŭ pligrandiĝis kaj fine devis la rusa registaro elekti inter du malagrablajoj la pli malgrandan t. e. aŭ malfermi la landlimojn por siberia eksporto aŭ restigi ĉe si hejme la revolucian elementon. Al tio ni povas aldoni, ke la Oriento ne havas signifon por greneksporto kaj eksporti norden estas malpermesite (la siberiaj riveregoj montras proksiman vojon tra Norda Glacia Maro al Skandinavio, Anglujo ktp., sed poste la Siberianoj nenion aĉetus en la rusaj centroj). Post la forigo de ĉeljabinska limdepagejo la eksporto kaj importo forte kreskis kaj atingos nur pli malfrue sian kulminacion. Multaj konstruotaj fervojoj certe helpos al disvolvigo de la vivo tie ĉi.

Kiel ŝajnas, havas Rusujo multe da zorgoj pro Siberio. En la lastan parlamenton Siberio sendis eĉ ne unu „dekstran“ deputaton kaj en ĉiuj demandoj ĝi montras sin fiere kiel progresema lando. La Rusoj ne amas Siberion t. e. siajn proprajn fratojn, ĉar ĉe la lastaj estas „al dio tro alte — al caro tro malproksime!“ Por puni la Siberianojn estas eldonita nova leĝo „de 3. junio“ per kiu oni malaltigas la nombron de siberiaj deputatoj je duono kvankam Siberio estas dekdufojojn pli granda ol Rusujo (eŭropa); sekve Siberio havas nun pli malmulte da deputatoj ol unu rusa gubernio (Kieva). Ŝtatan okupon, krom tute sensignifa, ricevas nur Rusoj. Ekzemple en la universitato de Tomsk estas el profesoroj eĉ ne unu Siberiano. Ke la Siberianoj ne amas Rusujon ĉe tiaj cirkonstancoj estas memkomprenebla.

Paralele kun la ekonomia evolucio aperis ankaŭ memkonscio societa, propra gazetaro, literaturo kun poezio. Alveninte ĉi tien mi eĉ ne havis ideon pri tio, ke tie ĉi vivas multaj scienculoj kaj verkistoj. La plej konata el la scienculoj estas G. N. Potanin (folkloristo), kiu gvidis kelkajn ekspediciojn tra Suda Siberio kaj Mongolujo. De li aperis multaj libroj, li estas la „Siberia Tolstoj“ de ĉiu amata kaj estimata kaj la Siberianoj rigardas lin kiel sian aŭtoritaton. Antaŭ multaj jaroj oni malliberigis lin, kiam li postulis aŭtonomion por Siberio, kulpiginte lin, ke li volis fondi siberian respublikon. Tiu 88-jara maljunulo vivas en Tomsk kaj estas ankoraŭ tre vigla kaj laborema.

Aleksandro V. Adrianov (arĥeologo) traveturadis la Mezan Siberion kaj liaj arĥeologiaj trovajoj kaj kolektoj estas en St. Peterburgaj muzeoj. Ankaŭ de li aperis kelkaj libroj; krom tio li estas konata jurnalisto.

V. J. Anuĉin (etnologo) okupas sin per studado de popoloj Nordsiberiaj kaj liaj verkoj estas eldonitaj de St. Peterburga scienca akademio. Speciale li studadis la „ŝamanismon“ kaj estas rigardata kiel kompentulo pri la siberiaj demandoj. Por unu antropologia verko li ricevis premion de tomska universitato. Krom

scienca laboro li estas unu el la unuaj kaj samtempe la plej granda siberia beletristo.

G. D. Grebenŝĉikov konatiĝis sin per rakontoj el la vivo sur montoj Altaj.

V. J. Ŝiŝkov rakontadas pri siberiaj vilaĝano kaj laboristo krom pri la siberiaj praloĝantoj.

A. J. Okulov vivas en Parizo kaj skribas pri laboristoj el oraj kampoj siberiaj.

Sur la kampo de poezio ni nomu J. J. Taĉalov originalan kaj fortikan ĥarakteron. poste lirikan simpatian poeton G. A. Vjatkin kaj anime je li parencan poetinon M. G. Vasiljeva.

El laboro de ĉiuj blovas freŝa aero de praarbaro kaj ĉiuj kredas, ke venos granda tempo por Siberio — por ilia vasta, senlima patrujo.*)

F. J. H.

BOHEMA SCIENCULO J. EV. PURKYNĚ ELTROVINTO DE DAKTILOSKOPIO.

Germana scienculo dr. Rob. Heindel publikigis en la germana gazeto „Die Woche“ artikolon „Mona Lisa kaj daktiloskopio“ en kiu li interalie skribas: En laikaj sferoj regas disvastigita la opinio ke la pariza Bertillon estas aŭtoro de esplorado bazanta sur la fingraj premsignoj. Tio estas eraro. Kiel mi jam antaŭ nelonge havis okazon pruvi en unu amerika gazeto, ne estis Bertillon, sed Bohemo Purkyně la unua, kiu faris la fingrajn premsignojn objekto de scienca esplorado. Komence monaĥo li sin dediĉis antaŭ sia pastrigo al studado de anatomio kaj fiziologio. vekis per fiziologia disertacio intereson de Göthe kaj fariĝis laŭ lia rekomendo en la j. 1823 universitata profesoro en Breslau. Tie li fondis la unuan fiziologian laboratorion. en kiu li konstatis. ke la papilaraj linioj formas karakterizajn figurojn. Entute li laŭ mia opinio konstatis kvin tipojn, kiuj ampleksas ĉiujn bildojn de la nomitaj linioj. Dum sia plua laboro li trovis, ke ĉi tiuj figuroj ne estas heredataj, kaj ke ne ekzistas eĉ du homoj, kiuj havus precize egalan bildon de la linioj. La Angloj, kiuj scias ĉion profituzi, kaptis tiun ĉi ideon kaj utiligis la teorion de Purkyně en praktiko por konstatado de identeco de personoj. Henry, la polica prezidanto en Londono, daktiloskopigis ĉiujn anglajn krimulojn, t. e. li deviigis ilin, ke ili premkopiu siajn dek fingrojn nigre ŝmiritajn en la respondajn rubrikojn de formularo. Tiuj ĉi fingrokopioj estis laŭ propono de Henry kolektitaj kaj ordigitaj kaj tiel fariĝis facila rekoni la krimulojn, se ili estis denove arestitaj kaj daktiloskopitaj.

*) Represado kaj tradukado estas permesita kondiĉe, ke oni sendu al nia red. du ekz. kaj ke oni citu la fonton. (Al tradukontoj ni sendos interesajn bildojn, por ke ili povu ilin uzi por preso).

Dr. Heindel konstatas per sia scîigo nekontesteble, ke aŭtoro de la daktiloskopia esplorado, kiu ludas gravan rolon en la kriminalistiko, estas Bohemo, kies eminenta scienca laboro gajnas per tio signifon tutmondan.

Al tio aldonas en la gazeto „Národní Politika" direktoro de biblioteko ĉe la Bohema Landa Muzeo univ. prof. Dr. Čeněk Zíbrt: „Mi permesas al mi atentigi pri mia artikolo „Dr. J. Ev. Purkynè kaj daktiloskopio" en „Časopis Českého Musea" 1910 kaj pri mia libro „Antikva-bohema ĥiromantio kaj nov-bohema manesplorado" en „Světová knihovna" n-o 819, kie mi kolektis el la fremdaj literaturoj dokumentojn, kiel ne sole la fakaj literaturoj angla, franca, hispana kaj itala sed mem la eminentaj fakistoj germanaj proklamas Purkynè kiel fonditon de la moderna daktiloskopio pro lia verko „Commentatio de examine physiologico organi visus et systematis cutanei", eldonita en Breslau 1823, kie li la unua atentigis je apliko de fingrokopioj por konstati indentecon de personoj. El Germanoj precipe dr. Roscher (Archiv für Kriminalanthropologie und Kriminalistik 1906) dediĉis varman memoron al Bohemo Purkynè. Ankaŭ en la verko de Windt kaj Kodiček (Wien 1908) estas noto pri li. La ĉefan meriton pri atentigo je Purkynè havas Dalmato dr. J. Vucetič, hejmiĝinta en Suda Ameriko, kiu eldonis serion da verkoj pri daktiloskopio kaj fondis sciencan societon daktiloskopian, al kiu mi laŭ lia peto sendis portreton de Purkyně kaj detalan biografion, kiuj estis la 23. V. 1910 prezentitaj al la scienca kongreso de Buenos Aires kiel memorajo je la unua kaj vera fondinto de daktiloskopio.

En la verko „Dermatologie" skribas pri tiu ĉi temo prof. de dermatologio ĉe la bohema universitato Dr. Fr. Šamberger. „La unua, kiu montris, ke la desegnajoj de la fingrolinioj havas antropologian signifon, estis Purkyně. Li distingis naŭ specojn de ĉi tiuj desegnajoj kaj nomas ilin jene: 1. flexurae transversae, 2. stria centralis, 3. stria obliqua, 4. sinus obliqus, 5. amygdala, 6. spirulla, 7. ellipsis, 8. circulus, 9. vertex duplicatus (al la teksto estas aldonitaj bildoj de tiuj ĉi figuroj laŭ la originala laboro de Purkyně). De post tiu tempo, precipe post laboroj de Galton, kiu 1888 laŭ studoj pri kopio de terminala palpada altaĵeto poleksa ĉe 2500 homoj pruvis, ke el formoj de ĉi tiuj desegnajoj povas profiti la kriminala antropologio, vico da aŭtoroj okupiĝis per tiu ĉi studado kaj la nombro de tipoj kompreneble plimultiĝis. Ekz. Feré priskribas kaj bildigas 41 tipojn de ĉi tiuj desegnajoj.

(*Tiu ĉi artikolo aperis en la 4. n-o de la esperanta revuo por medicino „Kuracisto". En ĝia 2. n-o aperis same interesa artikolo el plumo de s-o M. U. C. Markus pri la unika operacio farita de prof. Dr. Kukula, kiu sukcese transportis brakoston el mortinto en brakon de sia paciento*).

POR LA PACIFISTOJ.

Ĝis nun nekonata priskribo de la *batalo apud Leipzig* estas entenata en letero, kiun sendis el Mainz la 16. de nov. 1813 ĉefkuracisto de la granda armeo barono Larrey al sia filino kaj kiun nur antaŭ nelonge publikigis „Eclair“. La barono dum plenaj tri tagoj kaj tri noktoj restis sur la batalkampo kaj plenumadis en pluvo de malamikaj pafaĵoj sian devon en la armeo de la konkeranto. En la letero li priskribas la antaŭenmarŝon de Napoleono el Dresdeno laŭlongo de Elbo kaj kun poeta vervo li parolas pri la bordaj altaĵoj kovritaj de vinberejoj kaj fruktoĝardenoj plenaj de melankoliaj koloroj aŭtunaj, en kiuj trankvile laboradis la loĝantaro. Dum tagiĝo la 16. de okt. batale renkontiĝis la armeoj apud Leipzig. Kvankam la francaj fortoj ne povis laŭ nombro egali la unuiĝintajn armeojn, tamen la venko longe ŝanceliĝis, ĝis post la 12-hora batalado ĝi kliniĝis al flanko de la francaj agloj, sed ne tiugrade, ke la sukceso estu decida. La imperiestro restis kun sia armeo sur la batalkampo, ĉar la malamiko, kiu intertempe estis ricevinta fortan helpon, sin preparis por nova atako, kiu estis komencita frumatene de la sekvanta tago. „Ankoraŭ neniam mi vidis tiel obstinan batalon“ . . . rimarkigas Larrey, „kaj la malamiko estus repuŝita, se niaj partianoj ne estus nin subite perfidintaj kaj aliĝintaj al la malamiko. Pro tiu perfido ni perdis la venkon kaj sukceson; ni savis nian pozicion, sed nokte estis ordonite cedi. Kiajn penojn kaj turmentojn mi suferis dum tiu tago, por ke mi sufiĉu helpadi la vunditojn! Nokton kaj tagon mi pasigis sur la kampo por ilin savi kaj transportigi en la urbon. Ni devis cedi kun la armeo tra Leipzig. Estis plej urĝe, kelke da momentoj poste penetris la malamiko en la urbon de ĉiuj flankoj. Post nia transiro estis la pontoj deŝirataj sub hajlado de grenadoj kaj de kanonkugloj, kaj la ĥaoso atingis kulminon. La aero tremis de kriado kaj ĝemado de la kompatinduloj, kiuj estis finmortigataj, dispremataj aŭ dronis en la rivero. Ne silentiĝanta kanonado kaj eksplodoj de pulvoŝarĝitaj veturiloj prezentis teruran akompanon al ĉi tiu korŝiranta kanto de doloro kaj de morto...“ Kia tumulto ekregis post tiu ĉi momento, kiun la verkinto rajte nomas katastrofa, li priskribas jene: „Ne turmentis min, ke mankis al mi dum la unuaj du tagoj nutraĵo, ĉar mi tute perdis apetiton. Fine mi tamen estus suferinta pro malsato, perdinte la antaŭen forkurintajn samkorpusanojn, se mi vojire ne estus trovinta terpomojn. Mi havis nek ĉemizon, nek mantelon kaj mi estis tute senrimeda. Fine mi reatingis la perdiĝintajn . . . Ĉi tio estis nur antaŭludo al kunpuŝiĝo kun la Bavaroj, klopodantaj malebligi nian cedon. Ni ĉiuj estus mortigitaj aŭ kaptitaj, sed la imperiestro kaj la gvardioj estis ĉe ni kaj la perfidintoj devis kare pagi sian

perfidon. Ilia generalo estis mortvundita kaj plimulto de la militistaro pereigita. Mi troviĝis en ekstrema danĝero, bandaĝante la vunditojn sub kanonpafajoj kaj en nokta pluvego, sed ni trapuŝis nin feliĉe kaj atingis Frankfurton". Plue priskribas Larrey detale suferojn de la sekvinta sovaĝa returniro sur mallarĝaj, per veturiloj ofte baritaj vojoj, kaj li dankas la Providencon, ke li fine, venkinte ĉiujn malhelpojn, retroviĝas en la patrujo.

Imperiestro **Vilhelmo II.** *parolis al polaj soldatoj: „Se ni prenas de vi ĉion, kion vi havas, ni faras tiel pro tio, ke vi en batalo, havonte nenion, kio vin altiradus al vivo, oferu por ni la vivon sen bedaŭro".*

PROVERBOJ.

Estinta amiko estas la plej danĝera malamiko. Pecon detranĉitan al la pano ne realgluu. Amikon montras malfeliĉo. Amiko — intimulo. Amiko en ĝojo kaj ploro. Kun kiu vi festas, tia vi estas. Amiko fidela estas trezoro plej bela. Unu amiko malnova pli valoras ol du novaj. Ŝatu amikon laŭ la dato de akiro. Por amiko intima ne ekzistas vojo malproksima Por amiko komplezo neniam estas tro peza. Amiko de amiko estas ankaŭ amiko. Se amiko petas, li neniam ripetas. Pli bona amiko intima ol parenco malproksima. Pli bona apude najbaro, ol frato post arbaro. Gardu min dio kontraŭ amikoj, — kontraŭ malamikoj mi gardos min mem. Ĉe plej granda fido memoru pri perfido. Unu malamiko pli difektas, ol cent amikoj protektas. Kiu neniun savis, malamikojn ne havas. Por via bono vin regalas bastono. Plej kruela estas redono por farita bono. — Mensogu, kion vi volas, sed memoru, kion vi parolas.

FELIETONO

La idealisma karaktero de multaj Esperantistoj preskaŭ devigas ilin elpensadi novajn proponojn kaj trudi ĉiujn al la publiko por diskutado: kelkaj proponantoj, disponante por sia larĝbaza projekto almenaŭ iom da monrimedoj, provas tuj ĝin realigi kaj invitas kunlabori. — En la plej lasta tempo aperis en Ruslando ideo eldonadi ĉiutagan ĵurnalon esperantan, kies fondiĝon garantius kapitalo, kolektota inter ĉiuj samideanoj (ĉiu estu petita sendi tiucele 1 Sm t. e. K 2·40!) La projektanto supozas, ke la ĵurnalo estus — restante neŭtrala — de ĉiu abonata kaj ke ĝi povus anstataŭi la naciajn ĵurnalojn. Tia projekto estas kaj por longe restos nimero: ĝia aŭtoro estu iom pli skeptika rilate la monkolektadon kaj memoru, ke eldonajo ĉiutaga povas havi — konkurencota de la nacilingvaj ĵurnaloj — signifon kaj intereson por unu, du tagoj, efemeran. La transportado fremdlanden daŭros ĉiam tro longe kaj la novajoj sekve fariĝos por la alilandaj legantoj jam konitajo, kiun ili legis en „sia" nacia gazeto. Estas do grava demando, ĉu oni abonus krom la nacia ankaŭ la nemalkaran (pro la poŝtelspezoj!) internacian ĵurnalon. Por ke la projekto povu efektiviĝi, oni devus posedi centmilojn, per kiuj oni povus dum tre longa tempo kovri la deficiton!

INFORMOJ PRI LA BOHEMA NACIO.

Blanka korvo. „Der Fremdenverkehr", oficiala organo de la „Asocio de hotelposedantoj en Aŭstrio-Hungarujo" skribas en la 23-a kajero (VI. jk.) pri Praha laŭ maniero karakterizata per titolo de tiu ĉi artikoleto. Estas vere blanka korvo tiu germana gazeto, kiu traktas pri Praha kiel pri slava kaj bohema urbo kun ĉapelo respekte demetita rekomendante al fremduloj la urbon Praha kiel centron de historia kaj moderna belecoj kaj de modela gastameco. „Der Fremdenverkehr" plenigas la tutan kajeron per skizoj pri la bohema ĉefurbo, kiujn ĝi enkondukas per citajo el la germana poeto Detlev v. Liliencro (Eposo „Poggfred"): „Praha, na zdar! Dir gilt mein Liebeschwur!"; sekvas redakcia skizo pri Praha kaj historio de la urbo kun dek bildoj. En ĉiuj artikoloj estas respektata la bohema karaktero de Praha kaj ĝia oficiala bohema stratnomaro: Žižkov, Vyšehrad ktp. La redakcia artikolo tiom diferenciĝas laŭ siaj spirito, enhavo kaj formo de la maniero, kiun ni ĝis nun kutimis legi en la germanaj gazetoj ke ni citas kelkajn lokojn. La revuo skribas: „Jam Humboldt laŭdis la nekompareblajn belaĵojn de Praha kaj envicigis ĉi tiun urbon inter la plej eminentaj urboj sur la kontimento, kaj oni povas sole bedaŭri, ke ĝia signifo por la turisma movado ne estas ankoraŭ sufiĉe ŝatata. Tiun fakton certe helpas la tristaj politikaj cirkonstancoj, kiuj tamen ne influas la turisman movadon, ĉar ĉiuj nacioj gaste vizitantaj la urbon, devas esprimi sinceran admiron pri la belega bildo, kiun Praha restigas en animo de la vizitanto!" La aŭtoro esprimas varman deziron, ke pricipe la Germanoj el la imperio ekkonu la eminentan situacion, kiun Praha okupas en la tutmonda movado turisma.

SEN TITOLO.

Rabindra Nath Tagore, rekompencita per la literatura premio de Nobela fondo, naskiĝis en la j. 1861. Lia patro, mortinta antaŭ dek jaroj, estis filozofo Moharŝi, Devendra Nath Tagore. Kelkaj membroj de tiu ĉi vasta familio estis nomitaj de la angla registaro princoj (raĝoj kaj maharaĝoj), sed neniu el la supre nomitaj. Sed la patro, tre ŝatata kaj influohava, estis nomata de la popolo Maharŝi, t. e. „Granda sanktulo" kaj sendube ankaŭ lia filo heredos tiun ĉi titolon. Senprave proklamas lin la anglaj gazetoj poeto anglo-hinda. Senescepte ĉiuj liaj verkoj estas skribitaj en lingvo bengala kaj per ĉi-tiaj tipoj presitaj. Liaj naciaj kantoj estas aŭdeblaj en la tuta Hindujo; kelkajn li verkis kaj eldonis jam en sia juneco. Pli malfrue skribis Tagore romanojn, inter kiuj speciale estas citindaj „Gora" kaj „Nuoka Dubi" (t. e. al-

fundiĝo de boato“). Ĉirkaŭ 500 da siaj kantoj li muzikigis. Ĝis hodiaŭ li eldonis pli multe ol 30 volumojn da kantoj, poemoj, romanoj, rakontoj kaj dramoj. Tagore estas ankaŭ unu el la fondintoj de la nacia universitato en Kalkuto. En banejloko Bole Pur ap. Kalkuto li fondis edukejon kun supera lernejo por knaboj, nomatan Sauti Niketon t. e. sidejo de paco. La infanoj estas tie edukataj laŭ malnov-hinda principo de edukado, en senco de mondfrateco. *R.*

„Agence Havas“ portas la nomon de sia fondinto Havas, kiu estis tradukisto kaj fondis ĝin en la j. 1835. Li ĉerpis el fremdlandaj gazetoj gravajn informojn kaj sendadis ilin al redakcio de la pariza gazeto „Constitutionel“. Kaptinte la ideon, ke li povus malfermi kvazaŭan komercejon, li starigis en strato Rousseau malgrandan oficejon, sed la rezultato estis sensignifa. Nur post kelke da jaroj li havis bonan ideon starigi kolomban komunikon inter Parizo, Londono kaj Bruselo. Tio lin helpis: jam je la dua horo posttagmeze li havis en la mano sciigojn, kiujn la anglaj gazetoj ricevis kvar horojn post ilia apero en la ceteraj gazetoj. Tio estis grava progreso; en tempo, kiam ne ekzistis telegrafoj, signifis la kolomba raportado tian avantaĝon, ke ĝi fondis gloron kaj feliĉon de la agentejo Havas. Pli malfrue kompreneble estis por la sama celo uzata telegrafo kaj fervojo: novaj, similaj oficejoj estis fondataj, ekz. Reuter, oficisto ĉe Havas, malfermis en Londono similan agentejon, alia oficisto Wolf establiĝis en Berlino. La nomitaj firmoj estas la plej grandaj agentejoj en Eŭropo.

Etimologia klarigo: Ni ĉiuj scias, kio estas la ***kravatoj***; tamen konigas ĝin nek la formo nek la signifo de ilia nomo, ĉar la franca vorto ***cravate*** estas nur la nomo de la popolo „Kroato“, kiel tiun vorton elparolis la Francoj en la deksepa jarcento. La franca reĝo Ludoviko XIV. havis regimenton formitan el kroataj soldatoj, kiun oni nomis Royal cravate, t. e. reĝa-kravata anstataŭ reĝa-kroata. Tiuj soldatoj vestis pro malvarmo, sian kolon per blanka tuko, kiun oni ankaŭ nomis ***cravate***. Ludoviko XIV. kaj liaj korteganoj, imitiante ilin, portis baldaŭ multekostajn kravatojn ol punto. — ***Bojkoti*** iun estas konduti kontraŭ li, kiel kontraŭ s-o Boycott. Ĉirkaŭ la jaro 1880 angla kapitano nomita James Boycott agis tiel severege kontraŭ la farmistoj metitaj sub lia direktado, ke ili malamegis lin. Tial, post interkonsento, ĉiuj Irlandanoj rifuzis labori por li, rifuzis eĉ aĉeti de li aŭ vendi al li ion ajn, precipe la vivrimedojn Malgraŭ la angla ŝtateco li devis forlasi Irlandon. — Kiel klarigi, ke malvera informo de ĵurnalo estas nomita ***„anaso“*** (france ***canard***)? Por tio ni revenu malantaŭen je du aŭ tri jarcentoj. En tiu tempo oni diradis proverbe: „Doni, vendi al iu duonon de anaso“ (lasante kredi, ke ĝi estas tuta). Tiu frazo ekvivalentis jenan: „Trompi iun, igi lin kredi malveraĵon“. Oni poste malplilongigis ĝin kaj diradis nur „doni anason“ kun la signifo: „doni malveran informon“. Poste ankaŭ okazis kurioza fakto: oni ne rigardis plu la diron „doni anason“ kiel unu ideon, sed oni komencis la solan vorton „anaso“ uzadi en senco „trompaĵo, malvera informo“. (***Lambert***).

Z CELÉHO SVĚTA.

Svého času přinesli jsme zprávu, že francouzský továrník pneumatik **Michelin** věnoval 20.000 franků na odměny žákům, kteří během jednoho roku osvojí si Esperanto **tak**, aby mohli se podrobiti zkoušce o jeho znalosti. Ve všech francouzských městech uspořádány místními kluby zkoušky, při nichž byla již rozdělena řada menších odměn mezi 1000 kandidáty. Ze druhé — postupně těžší zkoušky — zbylo 29 kandidátů, mezi nimiž obdržel první cenu 2000 franků 19letý J. U. St. Gaston Lelarge z Poitiers, který vykonal Esperantem již dvě cesty po Německu.

Nový úspěch Esperanta: V říjnu konala se v pařížské Sorbonně valná hromada turistických spolků francouzských, na níž zastoupeny byly i spolky sportovní, svazy cizinecké atd., které mají několik set tisíc členů. Jednohlasně bylo uznáno, že Esperanto by bylo nejlepším prostředkem k povznesení cizineckého ruchu ve Francii, kam dnes mnozí -- neznajíce francouzštiny — neodváží se vyjeti. Na doporučení pařížských Esperantistů přijata tato resoluce: „Valná hromada francouzských turistických spolků uvážívši, že přijetí Esperanta v celém světě pro styky mezinárodní valně by přispělo turistice ve všech směrech a uvážívši všestranného použití Esperanta a služeb, které již vykonalo, usnáší se na resoluci, aby všechny francouzské turistické spolky, jakož i cizinecké atd. pomáhaly rozšiřovati užívání Esperanta a upozornily oficielní kruhy na tuto otázku.“

Výbor Mezinárodní **výstavy námořnictví 1914 v Janově** přijal Esperanto a jeho organisaci pro své reklamní účely. Zřízena byla zvláštní esperantská sekce, kterou řídí známý náš stoupenec dr. Alfred Stromboli; tato sekce rozesílá propagační esper. publikace jako brožury, nálepky a pohlednice. Esperantu jest vyhražena jedna strana v každém čísle nádherného měsíčníku „L'Esposizione di Genova“. Doporučujeme našim čtenářům, aby si vyžádali esperantským dopisem zmíněné esp. publikace od výstavního výboru. Adresa: „Komitato de Internacia Ekspozicio en Genova“ Via XX. Settembre 34—3.

Kongresy Esperantistů o svátcích svatodušních 1914:

Bourg: Esp. Federace Bourgogne, Jura a Rhodan.
Františkovy Lázně: Aŭstria Esperanto-Tago.
Horsens: Dánský sjezd.
Lipsko: Kongres Germana Esp.-Asocio.
Mecheln (*Malines*): Belgický sjezd.
St. Gallen: Kongres Švýcarského svazu.
Scheffield: Brita Esper. Kongreso.
Szeged: Uherský sjezd.
Sotteville-les-Rouen: Normanda kongreso.

„Federacio de la **Bruselaj** kluboj Esperantistaj“ oznamuje, že pod záštitou obce byla zřízena bezplatná informační kancelář v Passage du Nord. 19., kde se dostane cizím Esperantistům veškerých pokynů o pobytu, o památnostech atd.

Turistická informační kancelář v **Düsseldorfu** (91. Graf-Adolphstr.) vydala německého illustr. průvodce po městě; na poslední straně jest podán výtah Esperantem. Na požádání esper. dopisnicí zdarma. R. 1915 bude pořádána v Düsseldorfu velká výstava „Sto let práce na poli kultury a umění“. Tamní esper. spolek uspořádá při té příležitosti výstavku a prosí o zaslání vhodných předmětů. Výstavní výbor právě vydal esp. cirkuláře s programem výstavy.

Pod heslem **„Paco per Esperanto“** ustavil se spolek „Societo Esperanta por la Paco“ sídlem v Paříži. Informace: Centra Oficejo Esp. Paris, rue de Clichy 51. (Roční přísp. Fr. 1·25).

Mezi Čechy v Americe není naše hnutí neznámo: „Gradata Esperantista Societo“ v Chicagu velmi čile a s úspěchem propaguje Esperanto; pořádá četně navštěvované kursy a esp. zábavy. Duší celého hnutí jest dr. Šimonek a slč. Marie Kellnerová. — Na podnět p. M. J. Plešeho přednášela slč. Hammand členům Cosmopolit.-Clubu a posluchačům university v Iowě o Esperantu; po přednášce byl uspořádán kurs řízený p. Plešem. Horlivým podporovatelem těchto snah jest dr. Gow, prof. bot. kol. Cedar Rapids.

Z Australie. Starosta Port Melbourne navštívil schůzi místního klubu Esp., aby jeho členům projevil své sympathie s naším hnutím a sdělil jim, že chce pracovati na utužení a rozšíření písemných styků žáků středních škol melbournských s mládeží celého světa, aby poznali, že „jsou i jiné národy, tak dobré jako my sami“. Přesvědčil prý se že Esperanto jest k tomuto cíli nejlepším klíčem. Navrhl též zahájiti kurs pro mládež. — Čtyři městské čítárny v Melbourne vykládají britský esp časopis.

Esperanto ve Vatikáně. Svaz katolických Esperantistů konal 8. října IV. světový kongres v Římě; jeho účastníci byli přijati papežem v audienci, při níž doprovázeni hudebníky papežské gardy, zazpívali esperantskou píseň „Ni volas Dion“.

Dar ve prospěch propagandy Esperanta. Potěšitelný pokrok esperantského hnutí v Sasku byl v minulých dnech značně podpořen štědrým darem poslance Dr. Stecheho, předsedy místního svazu Esperantistů, který věnoval 10.000 marek jmenovanému svazu a Saskému státnímu ústavu pro propagandu Esperanta. Hlavním cílem, který dr. Steche svým darem sleduje, jest založení stálé informační kanceláře seperantské v Lipsku a honorování učitelů Esperanta. Poskytnutí takového peníze ve prospěch Esperanta může snad již otevříti oči i největším odpůrcům naší myšlenky, kteří z toho poznají, že jest již nutno vážně se zabývati otázkou Esperanta a nepodceňovati práci jeho propagatorů. Věnuje-li velkoprůmyslník, předák v životě politickém a obchodním na 12.000 korun takovémuto účelu, jest tím jistě dokázáno, že jedná se zde o více než o věc, kterou měl by kdo právo odmítati a snižovati, jak dosud namnoze z theoretické zaujatosti se činí, nebo prohlašovati ji za hříčku nepraktických idealistů.

Francouzská státní správa poštovní zavedla Esperanto do škol pro své úředníky a vybídla je, aby se přihlásili do kursů, které byly právě zahájeny v budově hlavní pošty v Paříži. Tyto kursy mají za účel poskytnouti poštovním úředníkům možnost, aby si osvojili znalost Esperanta, které bude jedinou jednací řečí v odbočce státní pošty na letošním X. světovém kongresu Esperantistů v Paříži. Stejně již na minulých sjezdech esp. byly vždy zřízeny odbočky pošty pro účastníky kongresů. — Poštovní úřednictvo založilo před několika roky svůj Světový Svaz Esperantský, který vydává velmi účelně redigovaný měsíčník „Poŝta Esperantisto“ a čítá na 500 členů ve všech zemích. — Podobně jest organisováno i úřednicto a mužstvo policejních úřadů, které v první řadě pochopily dalekosáhlý význam Esperanta pro účely mezinárodních styků nevyhnutelných v jejich službě. Rovněž těmto dostává se všestranné podpory od správ státních, které otevírají každoročně řadu nových kursů Esperanta. Střediskem tohoto hnutí jsou Drážďany, Paříž a Antverpy.

„LA ONDO DE ESPERANTO“

MONATA ILUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909). **Ĉiu abonanto de la j. 1914,** krom 12 n-roj de la gazeto, ricevos donace belan libron: **Esperanta Poŝkalendaro por la jaro 1915.** „La Ondo“ aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas 16—24 paĝ. Formato 17x26. Bela kovrilo. Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustrajoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Nia lanterno (kontraŭ Ido). Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.). **Anonco en »Koresp. Fako 3 respondkuponoj.** La abonpagon (2 rubl. = 2,120 sm.) oni sendu al librejo **„Esperanto“** (Moskvo, Lubjanskij projezd, 3. Ruslando) aŭ al aliaj Esper. librejoj: poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpagilo de Esp. Ĉekbanko.

Plej grava gazeto! **LA REVUO** **Nur esperanta!**

Ĝi estas la **sola** gazeto esperanta redaktita **kun la konstanta kunlaboro** de **Dr. Zamenhof** kaj kun helpo de la plej bonaj ĉiulandaj esperantistaj verkistoj.

Jara abono: **6 K**: unu numero: **60 hal.**

Ĉe **F. TOPIČ,** Praha I., Ferdinandova třída.

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA organo de la Lingva, Kongresa kaj Administra Komitatoj. Jare 5 K. Red. adm. **Paris, 51. rue de Clichy.**

Propagační různobarevné obálky s českým textem o Esperantu.

30 ekz. 50 h. vypl. Kancelářský formát: adresní str. nepotištěna.

ODZNAK Esper. (**pěticipá zelená hvězda v bílém kruhovém poli**) 70 haléřů, menší 50 haléřů vyplaceně.

KORESPONDANTOJ (*daŭrigo*):

En tiu ĉi rubriko estas publikigataj s e n p a g e adresoj de alilandaj samideanoj, kiuj serĉas korespondantojn inter Bohemoj. Atentigu pri tio viajn amikojn!

(*Mallongigoj*: int. = interŝanĝas; il. k. = ilustritaj kartoj; p. m. = poŝtmarkoj; bdf. = gluu la p. m. bildflanken; sgm. = sigelmarkoj).

*52. S-o Agostinho Brazil, *Juiz de Fora*, Cabo do 2. Batahão. E. de Minas. B r a z i l. Suda Amer. (il. k., p. m.). — *53. S-o Robert Boutelon, *Angers*, rue Parcheminerie 45. F r a n c u j o (p. m.; ĉiam tuj resp.). — *54. S-o R. Fouchard, *Angers*, rue Chepperonnière 2. F r a n c u j o (ĉiam tuj resp.). — *55. S-o E. Savreux, Bibliothèque de la Ville *Amiens*. F r a n c u j o (intŝ. p. k., p. m. kun Aŭstrio kaj la balkanaj landoj). — *56. S-o R. Souday, *Amiens*, 116. rue des Caroyer, F r a n c u j o (p. m. el ĉiuj landoj). — *57. S-o Leop. Eicher, *Southend on Sea*, Westcliff. 35. Beedel Ave. B r i t u j o (kor. per il. k. kun fraŭlinoj de la tuta mondo; ĉiam tuj resp.). — *58. S-o J. Theo. Zilliken, *Genova*, Casella postale 1113. I t a l u j o (respondas sole je b e l a j il. k. afrankitaj bildflanke; dez. trovi en Bohemujo s e r i o z a n korespondant(in)on por daŭra interŝ. de kartoj k. leteroj, kaj kiu interesiĝas pri Italujo). — *59. S-o José Yñarra, B i l b a o. Plaza Nueva 11 H i s p a n u j o. — *60. S-o Ernst Gold, vetarinaro. R u s u j o. Liflanda gub. per Quellenstein. — *61. S-o Paŭlo Smirnov, Verĥneuralsk. Orenburgskaj gub. R u s u j o (p. m.). — *62. S-o B. Gluchovski, instruisto, Huta B. Hanlke, p. *Czestochova*, R u s a P o l u j o (il. k., p. m.). — *63. S-o W. Unruh, Dresden. N. 6. Kurfürstenstr. 9./III. (p. m., precipe sgm.). — *64. S-o Karl Bergmann, terkulturisto, *Süderbrarup*-Holm. Kr. Schleswig. G e r m a n u j o. (il. k., let. precipe kun fraŭlinoj). — *65. S-o Armin Krause, *Sablon b. Metz*, G e r m. (il. k., p. m.). — *66. S-o P. Straube, Burg 12. *Kahla*. S. A. G e r m. (il. k., sgm.). — *67. S-o E. Graubaum, *Eberswalde*, Grabowstr. 44. G e r m. (il. k.). — *6. (legu) S-o Friedrich Schwarz, *Offenbach a. Main*, Sprendlingerstr. 9. G e r m. (il. k.). — *68. S-o Spire Sámuel, *Ungvár*. H u n g a r u j o. (il. k., let., ĉiam tuj resp.). — *69. S-o Jos. Sebestyén, *Székesfehérvár*, str Kierjo 24. Hung. (il. k.; pri skolto-scauting). — *70. S-o Jos. Karaszek, *Budapest*, 8. Kalvária tér 18. I./9. (kolor. il. k., intŝ. p. m.). — *71. S-o Vinc. Német, teologo, *Kiskundorozsma*, Kossuth- u. 1. H u n g a r u j o. (let. il. k.; markon bildflanke!, kor. kun ĉiuj landoj). — *72. S-o Sochański Vlad. *Lienz*, Gasthaus „Alte Post“, T i r o l. — *73. S-o S. Pintado, instr. kaj redaktoro en *Sieteiglesias* (Valladolid) H i s p a n u j o (il. k., p. m. pentraĵoj, let. pri diversaj temoj; tuj certe resp.). — *74. S-o Alois Drechsler, *Regensburg*, Unt. Rarhgasse 10./I. G e r m a n u j o (il. k., let.). — *75. F-ino Sofio Spire kaj s-o Sámuel Spire en *Ungvár*. H u n g a r u j o (il. k., let. bdf.). *76. S-o Tadeusz Mikowski, *Lwów*, G a l i c i o (il. k., let., bdf. ĉiam tuj resp.). — *77. S-o H. Asker, *Melbourne*, Noone str., Clifton Hill, A ŭ s t r a l i o.

La sekvantaj adresoj (sen) estaj ĉerpitaj el aliaj gazetoj*:

Corso di Esperanto, Scuola tecnica serale Baliano (60 studantoj de teknika lernejo serĉas korespondantojn). *Genova*. Italujo. — Esperanto-Grupo en *Hof* (Bavarujo) interŝ. aŭ vendas esp. sgm. 120 ekz. por 1 M. — F-ino Maria Jurgens, *Boxtel*. Bosscheweg. Nederlando (p. m.). — F-ino Adelaide Jacobescu, studentino, *Bukaresti*, str. Golesti 10. Rumanujo (il. k.). — S-o Charles D. Ray, D

O. *Le Mars*, Iowa, U. S. Amer. (il. k.). — S-o A. Tertus, *Odessa*, Rizovskaja 36. Rusujo (il. k., let.). — F-ino Furneaux, Portsmouth, 31, Montgomerie rd. Anglujo (il. k.). — S-o Emile Gougeat, *Sidi Abdallah*. O. M. Tunizio. — F-ino A. Joanides, *Smyrne*, Deutsche Post, Box 133. Azia Turkujo. (let.; p. m.; il. k.). — S-o Petro Casas, *Torello*, str. Carrera 36. Hispanujo (il. k., let.). — S-o Julius Bülow, *Zürich*. Kinkelstr. 5. Svisujo. (il. k.). — Membroj de junula esp. grupo en Limoges, adr. s-o A. Penot, 25. Bd. Gambetta (Hte Vienne) Francujo. (let., il. k., p. m.). — S-o Delezoide, instruisto, *St. Omer* 59, rue Guillaume-Cliton, Francujo (serĉas korespondantojn por siaj 50 lernantoj). — Foot-Ball Club „Esperanto", *Santiago*, Nataniel 480. Chili (dez. interrilatiĝi kun similaj societoj). — S-o Rouveret, instruisto. *Bagard*, Gard. Francujo (petas informojn pri eksterprofesia laboro de geinstruistoj; ĉiam resp.). — Grupo da instruistoj kaj gestudentoj dez. kor.; adr. s-o P. M. Schuyler, lernejestro, *Pickford*, Michigan, U. S. Amer. — S-o Edw. H. Becker, *Dayton*, 332. Third ave. Kentucky, U. S. Amer. (il. k.). — S-o E. D. Bernstein, *Papanui*, Chapel str. Nova Zealando (il. k.). — S-o S. Garcia, *Bilbao*, Bodegas Bilbainas. Hispanujo (il. k.). F-ino F. M. Bartholomew, Letshworth, Sunnyside, Norton Way North, Herts. Anglujo (serĉas kor. por siaj 14-jaraj kursanoj).

Mi serĉas boheman samideanon, kiu ne parolas la germanan lingvon, por konversacii kun li esperante. Eble iu volos fari **ekskurson tra suda Moravio** (tre vizitinda estas la valo de Thaja-Dyje), ĉe kiu mi tre volonte akompanus lin. Proponojn sendu al s-o Johann Noisser, faka instruisto en Grusbach (Suda Moravio).

Ŝatinda **okazo por konversacii** esperante en Praha. Nia delongtempa samideano s-o K. E. Macan, instruisto en la blindulejo de Klar (Praha III- 131.), petas spertajn Esperantistojn, kiuj volus uzi la okazon interparoli esperante, ke ili sendu al li sian adreson. Li estas libera lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede 8—12, 2—4.

Eldonanto: **Ed. Kühnl.**

Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství spol. s r. o. v Praze.